

Dudek mikronoveloj el la hispanlingva

Cuando se derrama el mar

(Kiam elverŝiĝas la maro)

Premio Iscariote 2023

verkita de

Elena Bethencourt

tradukis Christian Rivière



Sub la leĝera pluveto

Ĉe la numero 25 de la strato de l' Sol eniris nubo, ĝuste kiam la proprietulo eliris kun valizeto en la mano. Ĝi disiĝis ĝis kovri la tutan hejmon kaj ekfalis pluveto, kiu refreŝigis sen trempi. La kanario, kredante esti en la aero, ŝvingis siajnflugilojn. La avino kredis sin antaŭ la pordo de la ĉielo, jam forgesinte siajn dolorojn. La geknaboj oportune kaŝkaŝludis en la apenaŭa videblo. Rosa, konvinkita ke temas pri la vaporo de siaj larmoj, ĉesigis sian ploradon kaj malfermis la pordojn kaj la fenestrojn.

La najbaro profitis de tio por enŝteliĝi kaj, en la nebulo de la koridoro, trafis la bonŝancon kaj la lipojn de Rosa. Tiu ĉi supozis ke ŝia edzo estas reveninta kaj, envolvite en la pluveto, lasis sin amori.

Nun, ili ĉiuj vivas en nubo. Ĉiuj krom Rosa, kiu ja scias ke tiu viro ne estas ŝia, sed preĝas por ke neniam plu ĉesu la pluvado.

Rendevuo sur la kajo

De kvardek jaroj ili ne renkontiĝis, sed ne pasigis eĉ unu tagon sen pensi pri tiu nokto, nek timi la retrovon kiun ili, gevidvoj, nun travivas.

Lola ŝatus esti tia kia en lia memoro. Manuel, esti tiel juna kiel ŝi konis lin. La forto de la gravito difektis, kaj ŝiaj mamoj ne plu pintas al la steloj, kaj li senhariĝis, ankaŭ senfortiĝis. Faltoj nereteneble plugis iliajn vizaĝojn. Kiu scias kiom tartro suferigis iliajn dentojn kaj de kiam iliaj ostoj doloras ?

Manuel jam atendas ŝin sur la kajo same kiel fianĉo kiu paciencas antaŭ l' altaro. Lola lante proksimiĝas ĝis la sola viro al kiu ŝi allasis sin. Ŝi spiras. Ŝi alvenas kaj, kvazaŭ sen rigardi lin, preterpasas. Li suspiras, trankviligite, kaj foriras alisence. Ili malaperas. Neniu turnas sin.

La kruda realo restas sola sur la kajo, certa ke estas memoraĵoj tiel belaj kiujn nek ŝi, nek iu alia rajtas ŝanĝi.

Transpasi la linion

La blanka linio aperis dum la nokto kaj duonigis la urbon. La urbestro diris ke estas signo kaj ke ni ne transpasu ĝin. Kaj kiu ni estis por lin kontraŭdiri ?

Unuflanke restis la apoteko, la viando-vendejo kaj la parko. Aliflanke la placo, la panvendejo kaj la hospitalo. Maldekstre la lernejo, la sportejo kaj la trinkejo. Dekstre, la preĝejo, la naĝejo kaj la tombejo.

Komence ni lamentis : kiel ni vivos sen hospitalo, kiel ni forpasos sen tombejo, kiel ni festos sen placo, kiel ni geedziĝos sen pastro... Sed pasis la tempo kaj ni sukcesis alkiutiĝi. Tiuj sen lernejo instruis al la geknaboj propahejme kaj memkuracis sin en la apoteko. Tiuj de mia flanko lernis kiel vivi sen viando, kaj ni konsoliĝis pensante ke almenaŭ ni havas panon.

Tiel ni vivis multajn jarojn ĝis klerulo nomis nin stultuloj : « Ĉu vi ne vidas ke ĝi estas nur kreto-linio kiun vi povas laŭvole forbalai aŭ transpasi.

Tiun ĉi nokton, centoj da homoj de ambaŭ flankoj proksimiĝis al la linio, ni enterigis la klerulon kaj konstruis la muron kiu nun trastrekas la urbon.

Malaperanta

Ĉiun tagon finiĝas mia mondo kaj, same kiel la cindro, ĝi renaskiĝas. Ĉiun matenon mi estas knabino nova. Fojojn blonda, fojojn bruna, en lando malsama, sine de alia familio, de aliaj lingvoj, kun alispecaj ludiloj.

Ĉiun vesperon mi adiaŭas la koramikon kun kiu mi povus plu resti, ankaŭ la amikinojn kiujn mi renkontis en la urbo.

Mi devus enlitiĝi kontenta, certa ke mi distriĝos vekigante en nova loko, sed ĉiun nokton estas pli kaj pli malfacile endormiĝi sciante ke mi rompos la koron de alia panjo.

La ŝanĝo

Tedas min la vivo el tiom da kunmanĝoj kun homoj supraĵaj. Dezirante iun ŝanĝon, mi decidis provi tion nomatan « aperti la koron » kaj delasis la mian ien-tien. Eniris malsatantaj infanoj, poste virinoj perfortitaj, homoj senhejmaj, laboristoj sensalajraj. Distris min tiu bruego de plebo kun ordinaraj problemoj, sed — post kelkaj monatoj — mi malinteresiĝis pri ili kaj petis ilin ke ili foriru. Ĉar ili ne volis, mi ŝlosis la pordojn kaj lasis ilin ene. Tie ili plu bruas.

Por mi okazis granda ŝanĝo ĉar nun mi afektas neaŭdi ilin, dum antaŭe mi afektis ne vidi ilin.

La nevidebla viro

Mi kredas ke mi ne estas superheroo, tial ke mi ne flugas, krom en mia imago. Mia nura forto estas mia volo. Mi ne luktas kontraŭ la malbono, nur kontraŭ la malsato kaj la malvarmo.

Sed jes mi disponas superpovon : mi estas nevidebla. Mi povas trapaŝi la urbon sen esti vidata de iu ajn, esti tutan matenon kun petanta mano sen ke ili notas mian ĉeeston kaj, kio estas plej malfacile : mi povas paroli sen esti aŭdata.

Fojojn mi demandas min ĉu vere mi estas nevidebla aŭ ĉu la mondo estas blinda... Neniigu mian dubon. Ĉu vi vidas min ?

La puto

Ĉar nia precipa revo estis paso sub ĉielarko, iun pluvan matenon, mia fratino Elisa kaj mi kuris kaj kuris tra la kampoj. Ni celis trapasi tiun gigantan pardonon de koloroj kiu ŝajne des pli malproksimiĝis ju pli ni proksimiĝis. Sed ni, frenezigitaj de la projekto, plu antaŭeniris laŭ la tritikkampoj ĝis ni eliris el la vilaĝo.

Elisa neniam revenis.

De tiam mia panjo ne ĉesas plori. En ŝia ajncela rigardo eblas vidi kiel ŝvebas la knabino el ŝiaj okuloj. En ĉiu ŝia larmo reflektiĝas la irisa arko. Kaj per multe pli atenta rigardo videblas mia fratino kiu ĝin trapasas.

En la muzeo pri Historio

Kiam ni tratempas de la mezozoiko al la moderna epoko, de Pangeo ĝis la nuna mapo, de *Homo erectus* al *Sapiens*, mia mallonga vivo aspektas ĉiufoje pli signifa kompare kun la aĝo de Tero. Ĉiu etapo daŭris milojn da jaroj, por ne paroli pri la eterneco kiu estis necesa por analizi la donitaĵojn, kunligi la informojn, kaj konstrui teoriojn pri tio okazinta.

Tial mi ekprovas kompreni kiel via edzino povis detekti, en nur du tagoj, la Praeksplosion inter vi kaj mi, kaj kiel ŝiaj celoj — sen meteorito nek nek — tiel rapide neniigis la nian al l' vakuo.

Gvardistino de la dormoj

Kiel bona patrino, mi ĉiun nokton saltas de mia dormo, mi eniras tiujn de miaj filoj kaj mi savas ilin de la danĝeroj.

Hodiaŭ venas la momento savi la etulon antaŭ ol la monstro de la ŝranko rabos lin.

Dua-akte, mi kuradas kun la brakoj apertaj por kapti la mezaĝulon. Mi atendas lin piede de la konstruaĵo de kiu li estas falanta.

Poste mi fulme saltas por depreni la grandulon de la ungoj de la knabino kiu tagojn volviĝas en liaj okuloj. Ŝi estas pli rapida ol mi kaj, vidinte min, ŝi eskapas tra fendaĵo kaj metas mian filon en sian cerbon. Mi intencas eniri, sed tro malfrue ĉar ĉiuj pasejoj estas fermitaj. Nun miajn dormojn regas ŝi.

H₂O

L' aŭgusta varmo bruligas la korpojn. La humido gluas ĉe la haŭto. En banko de la placo viro soifas. Li observas kiel disiĝas gutoj de la frunto de knabino, likas ĝis la komisuroj de la lipoj kaj falas al la kolo. Li mense strekas la vojon sur la korpo-mapo dum ĝi glitas inter la konveksaĵoj de ŝiaj mamoj.

Akviĝas lia buŝo.

Kiu povus leki tiun guton kiu, kune kun aliaj, fluas alvalen al la umbiliko ; kunflui kun la torento sub la perfekta triangulo de la junulino ; inundi ŝin vole-nevole. Kiu povus pluvigi ŝin ; sin trempi plian fojon en tiu pluvo ; ĝui la malsekon de ŝiaj kaŝanguloj ; akvumi la sulkojn prisemitajn je deziro ; kunverŝiĝi sen malfortiĝi ĝis la lasta gutoj, de la femuroj al la planko.

L' aŭgusta varmo bruligas la korpojn. En banko de la placo, apogate sur sia bastono, viro likviĝas en flako de memoraĵoj.

La Urbo de la Ĝojo

Vi min diras ke en la Urbo de la Ĝojo ĉio estas rido kaj ke ĝiaj loĝantoj leĝere flugas. Kun la manoj sorbitaj de feliĉo, ili beligas kion ili tuŝas kaj ili pentras per brilaj koloroj la scenojn kiuj, en la fuŝa vivo, estas blankaj-nigraj. Ili ne posedas propran domon ĉar ili povas aperi en ajna loko kie ili iam vivis. Ili havas am-aventurojn kun personoj kiujn ili ĉiam deziris, sed senscie. Ili povas laŭvole retroi al la infanaĝo, ili denove renkontas siajn gepatrojn, ili faras piruetojn en la aero kaj realigas ĉion kion ili songas.

Mi lasas min transporti de via entuziasmo kaj, alkrōĉite al via mano, kun okuloj fermitaj, mi sorflugas.

Estas tiel magie ŝvebi en la areo.

Alveninte sur nubo rozkolora, mi malkovras ke vi pravas kaj mi vidas liliputaj ambaŭ injektilojn kiujn ni lasis forĵetitaj sur la grundo.

La Insulo de la Vento

Mi naskiĝis sur la Insulo de la Vento, insulo sekreta, malgranda, meze de Atlantiko. Dek paŝoj sufiĉis por atingi la nordon kaj, kiam mi plonĝis en la maron, ses brakomovoj sufiĉis por atingi la sudon. Tiam mi estis vestita de algoj kaj de konkoj, kaj la venteto — kirliĝa en miaj oreloj — flustris al mi vortojn de la maro.

Iun tagon, la tajdo alportis pereintan estron de sinkinta ŝipo. Mi enamiĝis. Mi songis ke mi naskas filinon de l' akvo kaj ke ni kunvivas inter anemonoj, fiŝoj kaj koraloj, sed mia kapitano foriris por submara plonĝado kaj ne revenis.

Mi petegis de la ondoj ke ili resendu lin al mi, kaj mi ploris senĉese ĝis, monatojn poste, alvenis ŝipo. Mi saltadis pro ĝojo vidante lin ĉe la rudro-gvidilo. Kvardek personoj alboridigis, ĉiuj krom li. Dum la novaj alvenintoj tretis mian marbordeton, mi plu atente rigardis al la ŝipo. Mi sukcesis legi « Ekskursoj al la insulo sekreta ».

La parolo de amo

Neniam mi tiom lernis en klaso kiom en tiu jaro kiam la profesorino pri la angla alvenis neklarigeble rebeligita de la somera ferio. Ŝia feliĉo same ŝvebis kiel avio el papero tra la klasĉambro, kaj ni pasigis la horojn flugante.

Por *Listening* ni aŭdis romantikajn kanzonojn. Por *Speaking* ni teatrumis je *Romeo kaj Julieta*, por *Reading* ni devis legi la historion de famaj paroj de ĉiuj epokoj, de Marco Antonjo kaj Kleopatra ĝis John Lennon kaj Yoko Ono, kaj por *Writing* ni skribis amleterojn.

Sed iun matenon la profesorino plu restis senmova antaŭ la tabulo kun feltkrajono en la mano. Post momento, malgraŭ retenita plor-singulto, ŝi klarigis al ni en nur dek kvin minutoj la saksan genetivon, la nerekthan stilon, la kondicionalajn frazojn kaj la pasivan formon. Poste ŝi plenigis la tabulon per vortoj por difini ilin en la angla : bombado, tertremo, vulkana erupcio, ciklono, uragano kaj amasdetruaj armiloj.

Ni sekvis ŝian alrigardon al la korto tra la vitraĵo. Ni vidis la profesoron pri la germana kun-kune kun la sekretario de la Centro kaj en tiu momento ni eksciis, ke sen amo ni certe lernos nenion.

La soifo de la tero

Don Benito ne komprenas kiel lia bofilo, eĉ post ol stuci tigojn de la vito la tutan tagon, plu emas viziti la korpon de la vidvino Izabel.

Li same malfacile komprenas kiel ŝi, post ol malsupreniri ĝis la fundo de la ravino por preni akvon aŭ por lavi la vestaron de siaj tri knaboj, laca pro la rikolto, pro la gren-batado aŭ la akrigado, plu apetas ke edziĝinta viro donu plezuron al ŝi.

Ne ekzistas loko kie lia filino ne priploris sian penon. Same ne ekzistas pado nek placo nek trinkejo, kie oni ne parolas pri la konveksaj mamoj de la vidvino Izabel. Pri la brila hararo kiu glitas kaj kiun ŝi kovras kiam ŝi formetas sian nigran fulardon. Pri haŭt-sulko kiu onin allogas kvazaŭ amo estus semo kaj vi la sola viro kompetenta pri semado...

Ne, don Benito ne povas permesi tian ofendon.

La tuta vilaĝo scias : la edzo de lia filino estas nefidela. Tial li petis ke tiu ĉi venu kaj ordonis ke li flegu sian edzinon, ke tial li edziĝis kun ŝi. Ke li naskigu al ŝi infanojn kiuj heredos, ĉar li volas profiti de siaj nepoj antaŭ ol li maljuniĝos. Li minacis lin je senigo de la terenoj kaj de la vivo se li vidos lin denove proksimiĝi al la domo de tiu virino.

Li taskis sin mem prigardi lin, kaj li tiucele ĉiun vesperon gvatis en la strateto de la vidvino Izabel.

Dum semajnoj li propraokule kontrolis, ke lia bofilo ne vizitas ŝin : « fine li komprenis la mesaĝon kaj ne revenos promenadi ».

Nun Don Benito alvokas al la pordo de la vidvino kaj eniras.

Kongruaj trajektorioj

Hieraŭ, en la metroo, mi ekkonis kaj perdis la virinon de mia vivo.

— Ho, vi estas leganta la saman romanon kiel mi — mi diris al ŝi.

Ŝi ridetis. Ni diskutis. Plaĉas al ŝi la flamenko, mi estis dancisto. Ŝin pasiigas la montaro, mi grimpadas. La glaciaĵojn kun kokoso ŝi ĝuas, mi ŝatas la kokoson ĝis en la sapo.

Ŝi estas parcel-mezuristino ; mi estas arkitekto. Ŝi petis mian telefon-numeron. Mi tuj elpensis unu — kiel kutime —, sed mi promesis al mi, ke neniam plu mi estos tiel stulta.

— Krome — ŝi diris antaŭ ol eliri —, mi nomiĝas Aminda, kaj vi ?

— Amĉjo.

Malbonaj elektoj

Ĉion ĉi mi faris pro amo, via Moŝto. Mi enamiĝis de mia najbarino, sed tiel bela virino havas mil svatiĝantojn. La konkurenco estas senkompata kaj mi mem estas tre timida. Do mi skribis al ŝi mesaĝon, mi enmetis ĝin en la sepian koverton de la Senato kaj mi aliris al la tablo de la baloto kies prezidanto estis ŝi. Mi enŝovis ĝin en la urnon, kaj mi revenis hejmen fantazianta pri ŝia vizaĝo kiam ŝi trovos mian mesaĝon okaze de la skrutinio.

Ĝi ŝajnis al ŝi tiel tenera, ke ŝi provis kontakti min ĉi tiun nokton mem, certe. Aŭ eble ne. Ĉar mi ne volus ridindiĝi ŝin... Mi ekpanikiĝis, angoris, mi ne scias... Mi devus pripensi pli pri la konsekvencoj, sed mi konfuziĝis, via Moŝto, mi eniris la balotejon ĵus antaŭ la oka vespere, mi prenis la urnon kaj forkuris.

Flugo

Tiu bruo mortigos min pli-malpli frue. Mi estis trijara la unuan fojon kiam mi aŭdis ĝin kaj ĝi neniam plu malaperis. Mi aŭskultis ĝin dum mia infanaĝo, okaze de mia unua kiso kaj en la universitato. Ĝi ĉeestis mian edziĝon, la naskiĝon de miaj infanoj kaj kiam ili foriris de nia hejmo. Ĝi eksonis pli laŭte je mia kvindekjariĝo, kiam alvenis la genepoj kaj kiam forpasis mia amo.

Ĝia sono eĉ postsekvas min tagon kaj nokton kaj baldaŭ atingos min, mi scias tion. Sed mi jam ne plu povas kuri kaj ĝi flugas : « Tik-tak, tik-tak, tik-tak ».

Post-vero

Li ĝisnelge estis nekonato. Tamen, li estas ricevonta la plej prestiĝan literaturan rekompencan pro sia unua kaj ununura romano.

Sen antaŭ-atribui la premion, la nacia gazetararo asertis, ke li estus la premiito. Sen publiki la romanon, tiu jam estis forvendita. Kiam li metis la finan punkton, ĉeestis miloj da homoj atendantaj antaŭ lia hejma pordo. Dum li skribis ĝin, la televidoj asertis lin geniulo. Antaŭ ol ĝin komenci, la popola radio-elsendo prezentis lin kiel faman aŭtoron.

Kaj ĵus antaŭe, spontanee, kreskis la rumoro : Eduardo estis skribanta. Iu vidis lin aĉeti paperon.

Prioritatoj

Politikisto dezirante scii al kio li koncentru sian politikon, starigis konkurson kun alloga premio. Por partopreni, la kandidatoj devis alporti tion kio estis nemalhavebla en ilia vivo.

Amase venis homoj de ĉiuj aĝoj kaj de ĉiuj kondiĉoj. Ili alportis telefonojn, hejmo-bestojn, tablojdojn, la Virgulinton, monon, medikamentojn, librojn, kpt. Iuj alportis aferojn malpli konkretajn : saĝon, scivolemon, seksemon, belecon aŭ amon.

La regularo estis prezentata : gajnos tiu kiu sukcesos konvinki ĉiujn, ke li alportis ion esencan, kaj ĉiuj restos tie unu semajnon, sen ekstera helpo, uzante nur tion alportitan.

Tiel restis nur tiu kiu alportis 20 litrojn da akvo.

Simbiozo

Vi ripetas ke mi ne zorgu, ke tio grava en nia rilato estas la simbiozo. Duan akton, vi klarigas al mi la interligitecon inter la abeloj kaj la plantoj : la insekto sin nutras per la nektaro de la floroj kaj ĝia vojaĝo favorigas la polenadon.

Poste vi parolas pri la likenoj, pri unuiĝo de fungo kaj de algo, kiuj kuniĝas por kolonii pli da teritorio. Vi aldonas ke la rinocero kaj la birdo sin helpas reciproke. La birdo senigas ĝin je parazitaj kaj dume nutras sin.

Vi insistas pri kiel ni profitas unu de la alia, kion mi profitas de vi, kion mi donas al vi. Nu, vidu, mi estas konvinkita, dank' al la simbiozo, do mi tuj forlasos vin. Fine mi komprenas vian rolon en nia rilato, kaj mi estas laca ke vi estas la birdo kia vi estas, la parazito, la fungo kaj, fine, la insekto kiu senĉese vagadas de floro al floro.